001 : 061.2(421) : 3—057(100—87)

## S.V.S. — UNIKA SCIENCISTA KLUBO.

Sub la rubriko *„A unique club"* troviĝas en la 15-a numero de *„Science News"* artikoleto pri ĉi tiu klubo, *„The Society for Visiting Scientists"* mallonge „S.V.S." Ĝin fondis la *British Council* en 1944, por ke alilandaj sciencistoj, kiuj vizitas Londonon, povu interkonatiĝi kun siaj Britaj kolegoj, kaj tie manĝi kaj malkare tranokti. Oni esperis, ke kiam finiĝos la milito, similaj kluboj estiĝos en aliaj landoj, sed ĝis nun tio ne okazis, kaj ĉi tiu klubo restas unika.

Ĝi troviĝas malantaŭ *Burlington House*, kiu estas en la fame konata ĉefstrato *Piccadilly* en la okcidenta parto de Londono. *Burlington House* estas precipe konata pro tio, ke tie okazas ĉiujare la ekspozicioj de la *Royal Academy (of Art)*; ĝi estas ankaŭ la ejo de la *Royal Society* kaj de pluraj aliaj sciencaj societoj.

Krome la klubo provizas senpagan inform-servon rilate al la Britaj sciencistoj kaj iliaj verkoj, k.t.p. Tie okazas ĉiumonate dum la vintro kunvenoj kun diskutoj precipe pri temoj ĉe la limoj inter pluraj sciencoj.

Dum la lasta jaro 200 sciencistoj el 20 landoj gastis ĉi tie, kaj kredeble dum ĉi tiu jaro multaj deziros viziti la *„Festival of Britain"*, kaj la sciencan ekspozicion, kiu okazos ĉe ĝi, kaj volos kapti la okazon por viziti ankaŭ la klubon.

Mi ne scias, ĉu ekzistas iaj specialaj aranĝoj por uzi Esperanton en la klubo, sed mi opinias, ke tio prezentas bonegan okazon por ĝin utiligi. Do mi deziras atentigi la anojn de I.S.A.E. pri la ekzisto de la klubo, kaj pri la dezirindeco, ke oni starigu similajn klubojn en aliaj landoj.

Pluan informon pri la klubo provizos ĝia sekretario, profesoro F. J. M. Stratton, F.R.S.

1/9 : 159.9

## HOMAJ AFEROJ KAJ LA PSIKOLOGIA VIDPUNKTO *)

Prelego de

D-ro J. C. FLUGEL,

Prezidanto de la Sekcio „J" (Psikologio),

farita dum la jarkunveno de la Brita Asocio por la Antaŭenigo de la Scienco, Birmingham, 30 Aŭg.-6 Sept. 1950 **).

### La psikologia vidpunkto.

La Oksforda Vortaro difinas „vidpunkton" jene: „pozicio el kiu io estas rigardata aŭ vidata, aŭ el kiu bildo estas farata; ankaŭ pozicio aŭ aspekto en kiu io estas vidata aŭ rigardata". Do, vidpunkto kiel „pozicio" aŭ „aspekto" estas io aparta de la objekto vidata el ĝi aŭ de la bildo farata de el ĝi; sekve, vidpunkto de iu scienco estas distingebla de la faktoj aŭ konstatoj de tiu scienco. Vidpunkto restas sama, sendepende de tio ĉu la objektoj vidataj el ĝi estas multaj aŭ malmultaj, proksimaj aŭ malproksimaj, klaraj aŭ malklaraj, simplaj aŭ malsimplaj, kiel ni povas konstati, rigardante la saman vidajon el la sama pozicio, sed dum hela aŭ nebula tago. Simile ankaŭ la vidajo rigardata el vidpunkto akceptita de iu scienco povas esti klara kaj vasta, aŭ malklara kaj malvasta, depende de la progreso atingita de la scienco mem ĝis la momento de nia konsidero.

Kompreneble, devas ekzisti iu vidajo por ke ni povu paroli pri iu vidpunkto kaj se ni pensas pri iu vidpunkto, apenaŭ evitebla estas implica aludo pri tio kio videblas el ĝi. Malgraŭ tio tamen ni povas okaze tute prave kaj profite konsideri la vidpunkton de iu scienco kiom eble sendepende de la efektivaj atingoj de tiu scienco. Mi kuraĝus sugesti, ke tio ĝuste koncernas psikologion en la nuna stadio de ĝia disvolviĝo. La „bildo" prezentata de nuntempa psikologio estas — kiel sciate — multrilate malklara kaj nekompleta kompare kun la vasta, klara perspektivo de la granda teritorio, kiu laŭ niaj esperoj fine estos disponebla al ni. Kaj tamen eĉ la nura atingo de la karakteriza psikologia vidpunkto ne estas sensignifa por homaj progreso kaj bonfarto.

Pritrakto de la vidpunkto de iu scienco evidente implicas almenaŭ ioman komprenon pri naturo de tiu scienco kaj — se ni estas pedantaj — ŝajnas postuli ties difinon. Kiel konate tamen, difini psikologion estas malfacilege. Mi do intencas eviti tiun malfacilaĵon, premisante por nia nuna temo, ke psikologio estas ĉio tiel nomata en nia kutima lingvouzo, en niaj normalaj lernolibroj kun vortoj „Psikologio" aŭ „Psikologia" sur la titolpaĝoj (malgraŭ ke la libroj estas multaj kaj ilia pritrakto varias) kaj en resumaj fakaj raportoj aperantaj en tiaj periodaĵoj kiel *„The Psychological Bulletin"* (Psikologia Bulteno) kaj *„Psychological Abstracts"* (Psikologiaj Resumoj). Tiuscience psikologio inkluzivas vastan kampon limantan kun multaj aliaj fakoj. Precipe tamen ĝi ampleksas studon same pri menso kiel pri konduto kaj uzon de ĉiuj metodoj kiuj ŝajnas esperigaj kaj taŭgaj por tiuj celoj — se ili almenaŭ en kontentiga grado observas kutimajn regulojn de scienca procedo.

La problemo pri metodoj estas grava kaj ligita kun specialaj malfacilaĵoj kaj progreskrizoj en la historio de la psikologio. La espero pri eblo apliki al la menso iujn ekzaktajn teknikajn metodojn kiuj montriĝis tiom eminente sukcesaj en fizika scienco, gvidis sub influo de Fechner kaj Wundt al la gravrezulta enkonduko de eksperimenta metodo kaj kreo de psikologia laboratorio. Aliflanke tamen, malfacilaĵoj pri scienca pritrakto de la tiome eskapemaj fenomenoj de konscio kaj karaktero gvidadis al ribeloj bazataj sur senpacienco kaj malespero. F. J. Möbius skribis pri „senespereco de

*) Ĉe la fino de la artikolo troviĝas la difinoj de kelkaj fakaj neologismoj.

**) Tradukita (de d-ro M. Wajsblum) kun permeso de la Asocio laŭ la angla originalo aperinta en „The Advancement of Science" 7 224.

ĉia psikologio", J. B. W a t s o n volis malpermesi ĉian aludon pri menso en la de li esperata pli ekzakta scienco pri konduto, dum S p r a n g e r kaj aliaj reprezentantoj de la *Geisteswissenschaft* en Germanujo sugestis, ke psikologio estu kontenta pri sia modesta tasko de priskribo, forlasante la pli ambician aspiron al ekspliko, laŭ li neaplikebla en tiu sfero. Eĉ J a n e t kaj F r e u d kaj post ili preskaŭ ĉiuj modernaj psikopatologoj, kiuj ankaŭ siavice ribelis kontraŭ materialista malvastigo de la malnova psikiatrio, ĉiuj ili kapablis konservi sian interpreton en kategorioj de la menso nur dank' al ega plivastigo de sia koncepto de menso por ke ĝi ampleksu la grandan kaj malbone difinitan regionon de la „malkonscio". Kaj tamen, eĉ se la diferencoj inter konscio kaj malkonscio estas emfazataj, malkonscio estas ĉiam interpretata pere de analogio kun konscio, kiu laŭimplice disponigas la solan (kaj ĉiukaze ĝis nun la plej esperigan) ŝlosilon al kompreno pri tiuj mallumaj regionoj neatingeblaj de introspekto. Siavice, la *„behavioristoj"*, malgraŭ sia persista lukto por eviti ĉiun aludon pri la malbonvenaj por ili faktoj de konscio, ofte tamen — kiel ĝin montris iliaj kritikistoj — kulpe repekas almenaŭ pro neceso esprimi per malkonvenaj nerektaj frazoj tion kio estas multe pli nature kaj facile priskribebla en kategorioj de konsciaj procesoj. Dume, plej multaj psikologoj vidis sin devigitaj rekoni la konscion fundamenta (multrilate eĉ plej fundamenta) objekto de siaj studoj, ĉar la konduto de homaj estaĵoj kaj de almenaŭ la aliaj altevoluintaj animaloj estas plej facile komprenebla en lumo de tiu rilato inter niaj pensoj kaj deziroj unuflanke kaj niaj agoj duaflanke, kiun ni konstante observas en ni mem.

Rezulte do, kredo pri reala ekzisto kaj gravego de la menso estas komuna kvalito de ĉiuj psikologoj (kun ebla escepto de kelkaj ekstremaj protestemuloj) kaj la fundamenta faktoro determinanta la psikologian vidpunkton. Indas tamen interesi, ke en tiu sia kredo psikologio havas ion komunan kun primitiva penso. Kvankam nuntempaj antropologoj ŝajnas emfazi gravecon de animismo malpli ol la antaŭa generacio, estas tamen sendube, ke la tendenco interpreti videblan kaj senteblan mondon per nocioj de mensaj kaj spiritaj fortoj estas tre karakteriza trajto de primitivaj popoloj, samkiel cetere de ĉiuj popoloj nesubigitaj al influo de maŝina epoko kun ties fizikoscienca bazo kaj ties pensado per nocioj de mekanisma kaŭzado. Se temas pri niaj propraj infanoj, P i a g e t eble kulpis pri ioma troigo en siaj pioniraj esploroj, supozante, ke animismo estas pensmaniero neevitebla, eĉ ekskluzive karakterizanta iun stadion de mensa disvolviĝo. Kaj tamen ekzistas bona pruvo, ke kvankam nocioj pri pure fizika kaŭzado povas ekaperi eĉ en tre frua aĝo, atribuado (eĉ se duone luda) de deziroj kaj streboj al senvivaj objektoj estas multe pli kutima ĉe infanoj ol ĉe civilizitaj plenaĝuloj, tiel ke V a l e n t i n e povis diri: „ne necesas emfazi la precipe animisman pensmanieron de la plej multaj infanoj eĉ kvin- aŭ sesjaraj en ilia interpreto de materiaj okazaĵoj".

Efektive, estas sufiĉe klare, ke, dum mensa disvolviĝo de gento aŭ individuo, la sfero de animismo tendencas al progresa kaj drasta malkresko, kaj la sfero de materia kaŭzado konforme pligrandiĝas. Ekstrema behaviorismo provis konduki tiun tendencon al ŝajne logika konkludo, senigante la menson eĉ je tiu duba privilegio esti epifenomeno, la privilegio lasata al ĝi de la materialismo de la deknaŭa jarcento. Tiu ŝajne senkompromise logika konsekvencemo certe povus ŝajni la plej forta apriora argumento por behaviorismo. Plej multaj psikologoj tamen opinias, ke tiu provo fiaskis kaj persiste postulas por la menso almenaŭ etan, sed gravan lokon en la universo, evidentan en ilia propra konscio kaj dedukte ankaŭ en la konduto de iliaj kunhomoj kaj de multaj (eble de ĉiuj) kunanimaloj.



Sed psikologio faris pli ol nur savi ideon de menso kaj motivo kiel relikvon de la iam multe pli vasta amplekso de animismo. Se ĝi estus farinta nur tion, ĝi tenus nin sur vojo de simpla prudento, ĉar samkiel idealistaj filozofoj kredas je materio kiam ili ne filozofas, ankaŭ behavioristoj ekster siaj laboratorioj sendube kredas je menso. Estis tamen farita plua kaj tre grava paŝo. Strebante iĝi scienco, la psikologio — samkiel aliaj sciencoj — interesiĝis pri sia objekto pro ĝi mem, ne pro iu transa motivo. Pro tio ĝi diferencis de la granda plimulto de la pli primitivaj animismaj interpretoj, kiuj celis ne tiom la naturon kaj funkciadon de realaj aŭ supozataj faktoj, kiom la konsekvencojn de ties funkcioj, precipe la konsekvencojn por ni mem. Tiukaze, kiel ĉiam cetere, la celo de la „pura" scienco estas konstato de vero, de vero sendependa de niaj esperoj aŭ deziroj ne implicaj en la serĉado de vero mem. Tio siavice trudas severan disciplinon al nia menso: rezignon pri ĉia dezira aŭ „aŭtisma" pensmaniero kaj tutkoran akcepton de tio, kion F r e u d nomis „principo de realo". En terminologio de aliaj psikologiaj skoloj ĝi implicas la „determinan tendencon", „alĝustiĝon", aŭ „sintenon", en kiu niaj konpovoj devas labori plene kaj vigle kaj por tiu celo estas laŭeble liberigataj de ĉiu distordanta influo de orekta sfero. Tiu sinteno validas eĉ por „aplikata" scienco, kun tiu diferenco tamen, ke la esenca motivo ne estas serĉo pri la vero mem, sed deziro atingi iun praktikan celon por kies efektivigo povas helpi plia kono de vero. Aplikata scienco aspiras trovi rimedojn por tiu atingo, sed en sia strebado ĝi ree eliminas ĉian deziran pensmanieron kaj laboras tute konforme al la principo de realo, lasante al la konpovoj plenan kaj liberan regon. Inĝeniero eble deziras konstrui ponton, aŭtomobilon, aeroplanon, kuracisto kuraci aŭ profilaksi malsanon, psikologo celas eltrovi pli bonan metodon por lernado aŭ por malpliigo de industria laco aŭ malkontento, sed pro tio ke ili estas aplikaj scienculoj, ankaŭ ili akceptas por tiuj celoj vidpunkton kaj metodojn de siaj puraj sciencoj.

Elimino de dezira pensado, implicata en akcepto de scienca vidpunkto, kaŭzis en ĉiu fako gravajn konsekvencojn krom la eventuale rezultanta nura pligrandigo de utila kaj interesa kono. En fizikaj sciencoj ĝi implicas rezignon pri tiu alia granda pensosistemo, kiu same kiel animismo estas tiom karakteriza por primitivaj kredoj kaj por konduto bazita sur ĝi: la sistemo

de magio, sistemo reflektanta tion, kio en psikanaliza jargono nomiĝas „ĉionpovo de la penso" (aŭ — kiel ĝi devus nomiĝi pli precize — ĉionpovo de deziroj). Eble plej signifaj estas tiuj konsekvencoj en psikologio, parte ĉar psikologio en sia moderna formo estas scienco relative nova, al kies ekzisto la socio apenaŭ sukcesis adaptiĝi, parte (kaj sendube precipe), ĉar homa konduto estas sfero, en kiu estas speciale malfacile alpreni pure konan kaj senemocian sintenon. Niaj pasioj, niaj antaŭjuĝoj, niaj moralaj pritaksoj emas interveni pli serioze ol en konsidero de okazaĵoj en nehoma kaj materia mondo. Tial do akcepto de scienca, kona vidpunkto en tiu kampo povas esti samtempe pli malfacila kaj pli promesoplena je ebloj gravaj por la socio, ol se temas pri vidpunkto de iu alia scienco. Ĝuste pro tio mi kuraĝis sugesti, ke signifo de tiu vidpunkto por homaj aferoj ĝenerale povas valori specialan studon.

**Signifo de „Determina Tendenco".**

Antaŭ ol prikonsideri tiun signifon pli detale, en ties rilato al iuj specialaj fakoj, estus bone por ni, la psikologoj, rememori psikajn kaŭzojn de la sobriga impreso de adopto de objektiva, scienca vidpunkto je niaj sentoj kaj pasioj. La esenca kaŭzo de tiu fakto estas certe la fenomeno „amplekso", aŭ „malvasto de konscio", aŭ „universala mensa konkuro", kiel Spearman preferas ĝin nomi. Pro tiu konkuro nia konpovo emas elpeli nian strebon kaj afekcion, samkiel emocio ligita kun antaŭjuĝo kaj inklino paralizas nian juĝon kaj racion. Kiel iam esprimis ĝin iu parlamentano (kvankam kun eble misa emfazo je la fiziologia metaforo): „Klero emas ŝveligi kapon je kosto de malfortigata intestaro" — paralele al la nazista admono „pensi per sango", t.e. ke partianoj de tiu reĝimo intence instigu siajn emociojn al subigo de intelekto. Kaj tio rememorigas al ni, ke lastinstance la strebo determinas konpovon. Ĝuste, unuflanke, ekapero de spontanea intereso aŭ emocio aŭ, aliflanke, pli-malpli intenca adopto de iu determina tendenco estas la faktoroj, kiuj decidigas nin akcepti precipe konan aŭ precipe orektan sintenon. Tial do, se la strebo determinas naturon de nia sinteno, la fenomeno de amplekso sekurigas portempan forigon de diferencaj aŭ kontraŭaj sintenoj.

La adopto de precipe kona aŭ „scienca" determina tendenco estas unu el la plej grandaj atingoj de la homaro, permesanta al ĝi pensi kaj agi pli konforme al la principo de realo, ol alikaze. Plue, la eltrovo kaj pruvo de la graveco de determina tendenco mem estas unu el la triumfoj de la eksperimenta psikologio: en la limoj de malvasta, iom artefarita eksperimenta situacio ĝi konvinke montris kiel determina tendenco povas kontroli kaj determini niajn sentojn. Ni menciu nur kelkajn ekzemplojn. Wohlgemuth montris, ke oni povas intensigi malagrablajn sentojn kaŭzatajn de doloriga stimuloj, direktante la atenton de la observanto al la tuto de lia momenta psika travivaĵo, dum oni povas malintensigi aŭ eĉ nuligi tiujn sentojn laŭ almenaŭ tri manieroj: unue kaj plej evidente, direktante lian atenton al io alia, due



atentigante pri konaj aspektoj de la travivaĵo (ekz. variado de kvalito, intenso kaj loko de la sentaĵoj), trie (kaj unuavide ĝi estas iom paradoksa) penante atenti la sentojn mem, aparte de la tuta travivaĵo kies parto ili estas. En tiuj eksperimentoj la determina tendenco funkciis nur determinante la direkton de la atento. Aliaj eksperimentoj tamen montris, ke ĝi povus esti same efika determinante la naturon de orekta sinteno rilate al stimulo. Ashburn kaj Grose kaj post ili Yuan Pan montris, ke adoptante pozitivan „streban" aŭ „bonvenigan" sintenon rilate al stimuloj kutime sentataj kiel malagrablaj, ni povas rimarkinde ŝanĝi la tutan naturon de afekcia aspekto de l'eksperimento ĝis tia grado, ke ties rezulto (konsiderate en ties kuneco kun la bone konata fakto de seksa masoĥismo, elmontrata ekz. de skurĝemuloj) preskaŭ kredebligas supozon de McDougall, ke kristanaj martiroj povis ĝui sian martirecon, se ili bonvenigis kaj akceptadis ĝin kiel rimedon de savo kaj atesto pro plia gloro de sia Dio. Plenaj konsekvencoj de tiuj eksperimentoj por la sfero de sociaj sintenoj ankoraŭ ne estas formulitaj. Sed ankaŭ ĉi tie oni montris, ke sintenoj ekz. rilate al membroj de iu raso, povas esti ege ŝanĝataj pro taŭgaj spertoj, ekz. se oni renkontas membrojn de tiu gento en favoraj cirkonstancoj aŭ se oni atingas pli bonan komprenon pri ilia vivmaniero, malfacilaĵoj, aspiroj aŭ idealoj. En ĉi tiu kazo la ŝanĝo estas kaŭzata de radiado de la afekcio aŭ de la „kondiĉaro" kaj ne de intenca adopto de iu determina tendenco, plua studo tamen certe montrus, ke transiraj kazoj de duone volaj — duone senvolaj ŝanĝoj povas okazi kaj fakte okazas.

Tiuj esploroj — ekde momentaj artefaritaj kondiĉoj en laboratorio ĝis aferoj povantaj havi daŭran socian kaj politikan signifon — estas menciataj kiel ilustraĵoj pri signifo de ŝanĝoj en sinteno kaŭzeblaj de la determina tendenco. Vidante objektojn el la tiel nomata psikologia vidpunkto, ni intence akceptas konan determinan tendencon, laŭ kiu ni celas senantaŭjuĝe studi menson de aliuloj kaj nian propran. En tiu kazo la kona determina tendenco akcelas malpliigon de la potenco de afekcio, grandparte simile kiel okazas ĉe adopto de simila determina tendenco en simplaj laboratoriaj eksperimentoj.

**Konfliktoj kaj interrilatoj kun aliaj vidpunktoj. Filozofio.**

La adopto de la psikologia vidpunkto havas ne nur la pozitivan funkcion ebligi al ni novan pritrakton de multaj problemoj kaj pro tio plivastigi nian scion en ĉiuj fakoj en kiuj faktoras mensaj fenomenoj. Ĝi ankaŭ kontrastas kaj iugrade konfliktas kun aliaj sintenoj. Kaj studo de tiuj konfliktoj estas utila, eble eĉ esenca, por rekoni la plenan signifon de la psikologia vidpunkto rilate al homaj scio kaj konduto. Ŝajnas do prave dediĉi la ceteron de tiu parolado al mallonga revuo de la ĉefaj fakoj en kiuj evidentiĝas tiu konflikto.

Laŭhistorie, psikologio estas grandparte infano de filozofio kaj kiel multaj aliaj gepatroj, filozofio iufoje malemas rekoni la kreskantan sendependon de sia ido. Certe, problemoj de psikologio — ne nur historie, sed pro sia na-

turo mem — pli ol tiuj de fizikaj sciencoj proksimas al problemoj de filozofio. Diskutoj pri eblo kaj pravo de psikologio kiel sendependa scienco, furiozintaj en filozofiaj rondoj je la fino de la lasta kaj je la komenco de la nuna jarcento, estingiĝis pli ĝuste ol kontentiĝe solviĝis. Decida sendube estis la faktoro de metodo. Insistante pri observo kaj eksperimento kaj laŭeble pri mezurado, psikologio pli similas fizikajn sciencojn ol sian gepatran fakon, por kiu la proverba brakseĝo kaj skribtablo ĝis nun estas plene sufiĉa studaparato. Precipe surbaze de tiu diferenca procedo psikologio gajnis sian rajton al rekono kiel sendependa fako, tute aparta de la fakoj de metafiziko, epistemologio kaj logiko, al kiuj ĝi grandparte povas spursekvi sian originon. Se temas pri logiko, ĝi pliriĉigis tiun patran fakon. La tradicia formala logiko estis multe tro intelektisma kaj ignoris emocian bazon de nia pensado; laŭ mia opinio, konvinkas pri tio komparo inter tiaj libroj, kia, ekz., *„Rekta kaj malrekta pensado"* („Straight and Crooked Thinking") de Thouless kun iu el la pli malnovaj lernolibroj. Multo tamen estas ankoraŭ farota tiurilate. Ekde la *„Psikopatologio de la ĉiutaga vivo"* de Freud kaj *„Aŭtisma pensado"* de Bleuler ĝis la lastaj amerikaj studoj pri antaŭjuĝoj kaj „stereo-tipoj", psikologio faris multegajn kontribuojn pri la maniero laŭ kiu homa penso en sia praktiko estas malordigata de orektaj faktoroj. Plue, se oni akceptas opinion de Spearman, ke eraron esence konsistigas uzo de reprodukta proceso tie kie bezoniĝas la „edukta", do la psikologio faris gravan progreson koncerne nian komprenon pri pure kona aspekto de implicaj mensaj agoj. Dirante eĉ plej modere, ĉio ĉi signifas tre konsiderindan revizion kaj pligrandigon de la sekcio pri eraroj en niaj traktaĵoj pri logiko.

**Medicino, materialismo kaj determinismo.**

Medicino povas esti rigardata kiel la dua el la gepatroj de psikologio kaj precipe en tiu fako la psikologio konfliktas kun la materialista vidpunkto, kiel ekzemplate de la fiziologia kaj anatomia pritrakto. En ĉi tiu sfero, la psikopatologio devis progresi kontraŭ la opinio, ke malsanoj de menso povas esti interpretataj kaj traktataj en kategorioj de korpo, koncerne kiun neŭrologoj, „specialistoj pri cerbo" kaj pli freŝdate endokrinologoj sentis sin sur pli sekura kaj pli scienca grundo. Kompreneble, ne ĉiam estis tiel. En la plej fruaj stadioj la studo pri mensaj malsanoj devis lukti ĝuste kontraŭ krudaj animismaj teorioj pri „obsedo", dum la materialista sinteno bazata sur kreskanta medicina scio pri korpo kaj ĝiaj funkcioj estis sana reakcio kontraŭ la jam tro primitiva psikologia interpreto. Sed malgraŭ la granda progreso de fiziologia scio, multaj aspektoj de mensaj malsanoj restis neklarigeblaj en korporilataj kategorioj, kaj laboroj de psikopatologoj jam firme bazis la pravon kaj utilon de la psikologia vidpunkto en la medicino.

La grandaj finaj problemoj koncernantaj rilaton inter korpo kaj menso, estas tamen ĝis nun nesolvitaj kaj kredeble restos nesolvitaj. La konflikto de



psikologio kun materialismo en medicino kaj en aliaj fakoj estas unu el la aspektoj de la daŭra lukto inter la kontraŭaj vidpunktoj de vitalismo kaj mekanikismo, inter libera volo kaj determinismo. La nova scienco de psikakorpa medicino dume saĝe limigas sin ĉefe al la studado de la rilatoj inter korpaj kaj mensaj funkcioj, prefere ol provi entrepreni la pli ambician taskon determini kio estas kaŭzo kaj kio efiko en la korpo-mensa interrilato; koncerne kuracon, ĝi proponas korpan, mensan aŭ kombinitan pritrakton, laŭ tio, kiel la cirkonstancoj ŝajnas indiki aŭ permesi.

Ĉi tiu sama pragmatisma sinteno aperas en la maniero laŭ kiu psikologo kaj psikopatologo aliras la problemon de determinismo. Koncerne tiun malnovegan problemon, psikologoj eble povus esti tute prave akuzataj, ke ili klopodas ĉasi kun la hundoj kaj fuĝi kun la leporo. Kiel scienco laboranta per la samaj ĝeneralaj konceptoj kaj metodoj kiel la fizikaj sciencoj, la psikologio estas determinisma en siaj premisaĵoj tiusence, ke ĝi ne rigardas mensajn okazaĵojn laŭvolaj kaj neantaŭvideblaj; estas premisate, ke ilia eventuala ŝajno de hazardeco estas kaŭzata de limigiteco de nia scio en tiu fako, rekonata malfacila kaj kompleksa. Aliflanke, psikologio nepre devas pritrakti dezirojn kaj motivojn rilatantajn al iu estonta stato kaj pri agoj de elekto kaj vola decido, t.e. pri fenomenoj estigantaj nocion de libera volo. Ĝuste ĉirkaŭ tiu punkto furiozis la „batalo pri behaviorismo", kvankam McDougall, la protagonisto de kontraŭbehaviorista flanko, certe ne konsentus, ke allasante teleologion, li senigis psikologion je ties scienca rango. Freud, neante hazardon aŭ akcidenton en mensa vivo, penis pli sekure kaj komplete enkonduki menson en sferon de scienca determinismo, sed la trovitaj de li determinaj faktoroj ree estis motivoj kaj „deziroj", eĉ se nekonsciaj. Plue, se genetiko sukcesos klare pruvi heredadon de mensaj kvalitoj sur orekta flanko (kiel ĝi jam faris rilate al nia konpova doto), ni devos pli serioze ol ofte ĝis nun, priatenti la biologie determinitajn tendencojn en temperamento kaj instinkta datajo, tendencojn same nekontroleblajn de nia konscio, kiel ankaŭ niaj hereditaj korpaj karakteraĵoj — malgraŭ tio ke la diferencoj plue estos psikaj laŭ sia naturo.

Tiu evoluo ŝajnas aperigi du ĉefajn konsekvencojn tre gravajn por la influo de psikologio kaj de psikologia vidpunkto. La unua estas premisaĵo, ke eblas scienca esploro de motivoj, konsciaj kaj introspekteblaj aŭ nekonsciaj kaj nur dedukteblaj, kaj ke motivoj — malgraŭ sia teleologia naturo — aperigas sufiĉan regulecon kaj antaŭvideblecon por esti studeblaj per la ĝeneralaj metodoj kiuj montriĝis tiel sukcesaj en fizikaj sciencoj. Fakte, per tiu premisaĵo psikologio kviete evitis la malnovan problemon de determinismo kaj libera volo kaj eĉ ne provante serioze kaj rekte aliri tiun problemon, ĝi plue lasas ĝin al la filozofio. La dua konsekvenco estas akcepto de opinio, ke la sfero de menso kaj psikologio estas pli vasta ol la sfero de konscio kaj ke sekve ekzistas aspektoj de mensa vivo nekontroleblaj de konscia volo kaj elekto kaj eĉ en plej favoraj kazoj nur malrekte influataj de ili. En tiu

aspekto la menso tre similas la korpon: la striitaj muskoloj plenumas ordonojn donatajn de nia menso, sed ĉiuj aliaj funkcioj de nia korpo nur malrekte estas sub nia kontrolo. La konscia mio povas determini nian vivmanieron sur la plej alta nivelo, sed rilate al la cetero ni devas rekoni, ke ni estas „vivataj" de biologiaj procesoj, kiujn ni povas influi nur per metodoj malrektaj kaj ofte nur parte sukcesaj. Plej ofte nia korpo kaj menso kondutas laŭ maniero kiun ni mem konscias bedaŭrinda.

Tiu aspekto de psikologia vidpunkto kun ties implica paralelismo inter rego pri nia menso kaj rego pri nia korpo, estas grava por nia sinteno rilate al malsanoj de menso. Se tiu graveco estus pli ĝenerale rekonata, ĝi povus helpi al forigo de la stigmo de mensa malsano, kiu nun kaŭzas aldonan mizeron al la afliktatoj kaj kiu malhelpas ilin serĉi kuracon je la frua stadio, kiam la kuraco povus esti plej efika. Kun malmultaj esceptoj, korpa malsano estas konsiderata relative respektinda, pleje pro tio — laŭŝajne — ke ni paciĝis kun la fakto ke la rego de nia menso pri nia korpo estas limigita. Tial ni povas suferi kaj tamen konservi nian memrespekton. Multe malpli tamen ni paciĝis kun la fakto, ke profundaj internoj de nia menso estas preskaŭ same nekontroleblaj de niaj konsciaj deziroj. Tio — kiel Freud iam rimarkis en sia fama dirajo — estas por ni malfacile suferebla frapo kontraŭ nia vanto. Konsekvence, en mensaj malsanoj ni devas portadi ŝarĝon de ĝeno kaj honto iel pli granda, ol en kazo de korpa malsano. Homoj tamen sukcesis transvivi la antaŭajn traŭmojn kaŭzitajn de Kopernik kaj Darwin — kiel ĝin rememorigas Freud en kunligo kun tiu problemo. Kaj sendube ili iom post iom same paciĝos kun la tria, la plej sentiga frapo kontraŭ ilia memestimo. Ili ekkapablas kompreni, ke homa mio povas esti sana kaj fortika malgraŭ tio ke ĝi ne estas ĉiopova, eĉ ne en la sfero de la menso. Progreso de fizika kaj biologia scio provizis ioman kompenson pro antaŭaj humiliĝoj kaj la samo povas okazi pro kresko de nia scio rezultanta el studoj pri niaj pli profundaj mensaj procesoj. Se la kontrolpovo de konscia volo estas limigita, moderna psikologio kompense donas almenaŭ ioman indikon pri la fortoj kiujn ni frontas. Ni scias ion ankaŭ pri la maniero laŭ kiu nia konscia juĝo emas distordiĝi pro fortoj agantaj ekster ĝia ordinara vidkampo. Tial, eĉ se ni konservas multajn el niaj antaŭjuĝoj, ni povas almenaŭ trakti ilin pli bonhumore kaj kapabli sen troa honto konfesi, ke okaze ni povas erari.

La malfacilo, kiun ni spertas frontante fakton de mensa malsano, estas evidente firmigata per malŝato sentata kontraŭ la malkaŝoj de la psikopatologio pri la naturo de multaj mensaj tendencoj ne submetitaj al konscia regado. La psikologio elirinta el kabinetoj de filozofoj kaj laboratorioj de pioniraj eksperimentistoj, ofte povas ŝajni neadekvata, teda, eĉ bagatelema, sed dube ĉu iam ajn ŝokanta. Tio, tamen, kio aperis el konsultejoj de psikanalizistoj, ofte profunde vundis nian moralan kaj estetikan sentemon. La terurkrioj kaŭzitaj de ĝi jam mallaŭtiĝis iom kaj la edukita okcidento plejparte akceptis multajn nebonvenajn konstatojn. Tio siavice rezultigis malrapidan kreskon de sento



de psikologia realismo, eĉ en niaj pli-malpli oficialaj sintenoj kaj institucioj. Ni scias, ke homo ne estas logika aŭ virta tra sia tuta naturo, ke racio kaj morala sinrego nur malcerte regas kaj nur sur la plej alta nivelo, ke la ĉefa tasko de mensa kaj socia higieno estas trovi kompromison inter kruda malsocia esprimo de primitivaj impulsoj unuflanke kaj la danĝeraj inhibicioj kadukigantaj niajn fundamentajn energiojn, duaflanke. Por tiu celo estas esence grave, ke ni laŭeble distingu inter tabuoj (eble malnoviĝintaj kaj neraciaj) kaj vere kontraŭsocia konduto; kaj la psikologio ne nur devigas nin, sed ankaŭ helpas al ni, fari tiun distingon. Ĉi tie ni rimarkas la unuan indikon pri novspeca konflikto, la konflikto inter la psikologia, kaj tio kio estas proksimume difinebla kiel la morala vidpunkto — temo, al kiu ni ankoraŭ revenos.

**Ekonomio.**

La lukto kontraŭ materialista aŭ mekanikista vidpunkto, kiun la psikologio devis lukti en la medicino antaŭ ol ĝi pôvis pravigi sian propran vidpunkton, ripetiĝas nun (kvankam kun signifaj variajoj) en iuj aliaj fakoj. Unu el ili estas ekonomio. Certe, ekonomio ne povis tute rezigni je psikologio, ĉar esence ĝi koncernas ja konduton de homaj estajoj kiel produktantoj kaj konsumantoj. Por siaj celoj, tamen, ĝi akceptis el la psikologio de la deknaŭa jarcento la iom krudan raciisme-hedonisman koncepton de menso, kiu — kvankam eventuale allasebla por provizora simpligo de malfacilaj ekonomiaj problemoj — treege subtaksas tamen la efektivan kompleksecon de la homa naturo. En tiu tre grava fako estas urĝa neceso pri pli vasta akcepto de la psikologia vidpunkto kaj pri kunlaboro de ekonomiistoj kaj psikologoj por fari ĝin ebla. Kiel grandaj estas mankoj tiurilate, oni povas konkludi el la bonefikaj invadoj de psikologio en la kampon de la industrio, kiu ja estas cetere nur branĉo de aplika ekonomio. Ĝuste la industria psikologio pro sia insisto pri la „homa faktoro" montris eraron en tiaj krudaj premisajoj, kiel ekzemple, ke produkto estas rekte proporcia al laborhoroj, ke difektoj kaj akcidentoj estas pure „akcidentaj" kaj ke variemo de personara konsisto kaj forestoj pro malsano dependas nur de ekonmiaj kaj sanitaraj kondiĉoj. Pli ĝenerala rekono de la graveco de tiu homa faktoro en aliaj fakoj de la ekonomio, kiel distribuo, konsumado, ŝparado kaj elspezado certe montriĝos ne malpli malkaŝada. Por doni unu ilustrajon, ni diru, ke psikologiaj eksperimentoj pri elekto, kiuj en laboratoria medio povas ŝajni tre abstraktaj kaj neligitaj kun praktikaj vivaferoj, eble kapablos tamen doni utilan klarigon, kiamaniere milionoj da homoj ĉiutage elspezas monon en miloj da butikoj tra la tuta mondo.

**Eduko kaj konflikto kun morala vidpunkto.**

Se temas pri eduko, ni konstatas, ke ankaŭ tie akcepto de psikologia vidpunkto atentigis pri la neglektita aspekto de la homa faktoro, tiukaze rilate

al la lernoproceso. Ekzemple, ĝi evidentigis egajn trosimpligojn kaj distordojn proprajn al la klasikaj opinioj pri formala eduko, sur kiu tiom altgrade baziĝis la edukteorio, kaj multmaniere ĝi prilumis la kompleksajn problemojn pri akirado de lerto kaj scio kaj pri evoluado de tiuj kvalitoj de karaktero, kiuj permesas al ni fariĝi utilaj kaj agrablaj socianoj.

Samtempe, ĝuste en tiu fako, ni akiras novajn indikojn pri tiu konflikto inter la psikologia kaj la morala vidpunktoj, kiun ni jam rimarkis parolante pri iuj konstatoj de psikopatologio. Kompreneble, eduko iugrade devas esti morala proceso, ĉar la konduto postulata de ĝi ofte kontraŭas niajn primitivajn dezirojn. Sed al psikologo kun sia kona sinteno (mala al la orekta) ŝajnas ofte, ke tiu neevitebla morala elemento estis troe emfazata, tiel ke ĝi kaŭzas multe da nenecesa kulposento kaj sufero. Tio okazas precipe kiam rezulte de tia morala troemfazo oni fidas je pli-malpli arbitraj premioj kaj punoj kiel instigiloj taŭgaj por eduka proceso. Krome, tia sinteno emigas lernanton al malkvieto kaj trompo kaj instruiston al komforta kaj tro ofte kruela memkontento. En la pasinteco la kampo de eduko estis ofte plezura ĉasejo por sadistoj. Apogite de opinioj emantaj atribui ĉian nekapablon lerni al morala malforto, ili povis sen riproĉoj de konscienco kontentigi sian propran atakemon kaj ĝui plezuron per suferigado, ĉar oni supozis, ke la puno celas moralan bonfarton de la viktimo. Tio estis la raciigo de kruelo, kiun ni renkontas en aliaj sferoj, eĉ en pli malicaj formoj. Tendenco al relativa senmoraligo de eduko multon ŝuldas al psikologio. Certe, iuj eksperimentoj pri „libera" eduko, en sia reago kontraŭ la antaŭa morala tiranio iris eble pli malproksimen, ol emus aprobi multaj psikologoj, ĉar tiuj eksperimentoj ŝajnas tro multe postuli de individua konscienco kaj povas doni neadekvatan preparon por limigoj de libero neeviteblaj en vivo de plenaĝulo. Kaj tamen preskaŭ sendube la movado estas ĝenerale sana, grandparte dank' al anstataŭigo de tro ekskluziva morala vidpunkto per vidpunkto psikologia.

**Leĝo kaj krimo.**

Kiam temas pri juro kaj traktado de krimuleco, ni vidas, ke tiu konflikto inter la morala kaj psikologia vidpunktoj aperas en formo multe pli klara kaj malkaŝa. Kvankam moralo estas pli ampleksa ol juro, la leĝo estas esence nur kodigita moralo. La precipa tasko de la reprezentantoj de leĝo en ties diversaj fakoj estas konstati, ĉu la leĝo estas rompita, kapti la krimulon kaj se la kulpo estas pruvita, puni lin laŭleĝe. Tiel do iliaj sfero kaj vidpunkto tute diferencas de la sfero kaj vidpunkto de psikologoj. Sed la psikologia vidpunkto ekpenetras juron kaj komplikigas ĝin tuj kiam estas konsiderata la motivo, kiel okazas en ĉiuj progresemaj juraj sistemoj. Plua proksimiĝo al psikologio okazas, kiam profilakso de krimo estas konsiderata aparte de ties malkovro kaj puno. En okcidenta jura teorio tri ĉefaj celoj estas delonge kunigitaj kun puno: reeduko de la kulpulo, fortimiga efiko je aliaj eventualaj krimuloj kaj motivo de repago kaj venĝo. Laŭ sia propra vidpunkto, psikologoj tre prave demandas, ĉu puno laŭ pli-malpli fiksitaj kaj arbitraj reguloj efektive estas la plej efika metodo por rebonigo aŭ fortimigo. Ilia studo pri krimula menso supozigas, ke ĉefaj kaŭzoj de krimuleco estas troveblaj en kondiĉoj de la medio (precipe en la medio de junaĝa vivo), pri kiu la juro en si mem ne interesiĝas. En pli progresintaj landoj psikologoj sukcesis ege influi juran praktikon; ĉiam pli ofte kuraco estas aplikata anstataŭ puno, almenaŭ al junaj krimuloj, dum eĉ ĉe pli aĝaj krimuloj ĉiam pli ofte estas konsiderata ilia mensa stato. Tiu sukceso tamen forte konfliktigis la psikologion kun tiuj kiuj emfazigas leĝan kaj moralan vidpunkton kaj kiuj evidente estas influataj de venĝomotivo postulanta, ke tiuj kiuj suferigis senkulpajn socianojn, siavice suferu mem.



Psikologio apenaŭ povas neglekti la profunde psikologian fundamenton de tiu motivo; fakte, psikanalizistoj alportis pruvomaterialon, ke la nocio de puno, de „puno adekvata al krimo", profunde radikiĝis en la homa menso kaj sekve estas pli ol nur arbitra socia institucio. Sed ili montris ankaŭ, ke la efiko de puno tute ne estas ĉiam la sama. Se ĝi estas akceptata de krimulo kiel justa repago, puno povas havi sanan influon, se tamen ĝi ne estas akceptata, ĝi povas nur firmigi lian kontraŭsocian sintenon — aŭ ĉar li opinias, ke la puno forviŝis lian kulpon, aŭ ĉar la puno mem firmigas lian kredon, ke la socio estas lia malamiko. Plue, samkiel en la eduka sfero, puno ofte povas servi kiel raciigo de atakemo aŭ sadismo, aŭ kiel anstataŭa pento pro persona kulpo de tiuj, kiuj tiun punon postulas aŭ pere aŭ senpere respondecas pro ties plenumo. La tuta problemo de puno estas do tiel komplikita, ke psikologoj ne povas permesi al si dogmemon en siaj pretendoj; ili povas nur postuli la rajton pri ĉiu ŝanco de plua studo laŭ sia speciala vidpunkto. La valoro de tiu vidpunkto ne estas dubebla, eĉ se la demando, ĉu kaj kiam ĝi devas kompletigi aŭ anstataŭigi la kontraŭan leĝan aŭ moralan vidpunkton, aŭ cedi al ĝi, estas unu el problemoj probable nesolvotaj ankoraŭ dum multaj jaroj.

**Etiko kaj valoroj.**

Tiu konflikto inter kontrastaj aŭ kontraŭaj vidpunktoj en sfero de krimuleco tute nature kondukas al la demando pri rilato inter psikologio kaj etiko. Kiam mi kaj miaj samgeneracianoj ekstudis psikologion en komencaj jaroj de la nuna jarcento, ni kutime solvadis tiun problemon kontentige por ni mem, asertante, ke psikologio estas pozitiva scienco, kies tasko estas priskribi kaj laŭeble ekspliki fenomenojn de konscio kaj konduto, ne taksante ilin laŭ moralaj kategorioj, dum etiko estas normiga disciplino diranta al ni kiel konduti kaj kial. Kvankam ŝajnas, ke la plej multaj modernaj psikologoj ĝis nun ĝenerale konsentas je tiu distingo, oni devas tamen konfesi, ke limo inter la du disciplinoj iom malklariĝis, precipe pro du kaŭzoj. Unue, dank'al ega progreso de aplika psikologio en medicino, eduko, industrio, krimologio kaj en aliaj fakoj. Due, ĉar psikologio ĉiam pli interesiĝas pri mensaj strukturoj kaj procesoj implicaj en morala konduto, pri formiĝado de konscienco, pri

la faktoroj de karaktero determinantaj la „bonan" aŭ „malbonan" konduton, pri konflikto inter deziro kaj morala sinrego, pri volagoj kaj morala elekto. En sia esploro pri naturo kaj evoluo de konscienco ĝi montris relativecon de ĉi tiu mensa institucio (se estas permesate uzi tiun terminon), same se temas pri rilato inter individuoj kaj socioj, kiel interne de la individuo mem, ĉar konscienco ne estas homogena, sed entenas diversajn nivelojn, ne ĉiam akordajn logike aŭ etike. Ni konscias nun, ke iuj el tiuj niveloj estas krudaj kaj arkaikaj kaj (juĝate laŭ pli civilizaj kaj rafinaj vidpunktoj) ofte malrealaj kaj malboninfluaj. Granda parto de malhumaneco de homo rilate al homo estas kaŭzata ne tiom de simpla egoismo, senkompato kaj manko de simpatio, kiom de la funkciado de primitiva, malvasta kaj distordita konscienco. Tiel do, evidentigante kompleksecon de la konscienco kaj problemigante ties validon kaj internan koheron, la psikologio senigis la etikon je unu el ties armiloj, t.e. je senpera apelo al tiel nomata „morala sento", kaj faris la konsciencon dependa de psikologio en verdiktoj pri rango kaj respektindo de iu morala juĝo.

Se temas pri aplika psikologio, la psikologio mem, samkiel aliaj aplikaj sciencoj, premisas iujn celojn aŭ valorojn kaj serĉas plej taŭgajn rimedojn por atingi ilin. Ekzemple, ĝi premisas dezirindon de mensa sano, de efika lernado, de kontento kaj sukceso en laboro. La demandon pri valideco kaj valoreco de tiuj celoj ĝi lasas al aliaj disciplinoj kaj finfine al etiko. Tiel do, la distingo inter etiko kaj psikologio kiel aplika scienco, estas unuavide sufiĉe klara. Sed en la praktiko ofte aperas iuj problemoj kiuj konfuzas la bildon.

Unue, ni eble devos iam demandi: „Ĉu la celo pravigas la rimedon?" Tio povas okazi, se ekzemple ni devas decidi, ĉu probabla gajno de mensa sano pravigas elspezon de tempo, energio kaj mono por longdaŭra psikoterapia kuraco. La dua, pli grava problemo estas, ke ne ĉiam estas facile distingi la rimedojn kaj celojn. Fakte ekzistas tuta hierarkio de celoj: kio estas rimedo kaj kio celo, povas dependi de vidpunkto, kiu mem povas varii ĉiumomente — ĝis, sekvante la temon, ni estos devigitaj supozi iun finan esencan valoron, iun superan bonon, nediskuteble bonan en si mem. Ĉi tie la limo inter psikologio kaj etiko varios depende de tio, kion ni pormomente rekonas kiel rimedon aŭ celon. Trie, studo pri rimedoj povas iam modifi, plivastigi aŭ pridubigi naturon de la celo. Laŭ nia nuna opinio, iuj pioniroj de industria psikologio akceptis tro malvastan celon, emfazante studon pri tempo kaj movo; oni devis plivastigi celojn de tiu fako de psikologio por pritrakti ĉiujn aspektojn de homa faktoro en ĉiu speco de laboro. Plue, ni povas eĉ intence celi ŝanĝon de la celo en individua menso, ekz. kuracante krimulojn aŭ neŭrozulojn; espereble, dank' al kreskanta penetremo de psikologio, oni sukcesos modifi iliajn celojn kaj idealojn, direktante ilin al pli firma sociemo aŭ realismo. Tiaj modifoj povas koncerni eĉ grandajn grupojn; ekzemple, ni parolas pri „reeduko de iu popolo" aŭ pri „eduko por demokratio". En ĉiuj ĉi kazoj oni povas diri, ke la aplika psikologio, penante modifi homajn celojn, parte



koincidas kun sfero de etiko aŭ invadas ĝin, malgraŭ tio ke la psikologoj respondencaj pro tio plejparte apenaŭ rimarkas kaj eble ne emus konfesi, ke ili transiras limojn de sia propra scienco. Koncerne senperan studon pri valoroj, multo dependas de tio, ĉu ni samopinias kun iuj filozofoj ekde Platono, ke valoroj ekzistas sendepende de ties pritakso en la menso, aŭ kun aliaj, ke laŭ sia naturo mem ili estas subjektivaj. En la unua kazo ili lastinstance definitive estas ekster la sfero de psikologio, malgraŭ tio ke psikologio rajtas interesiĝi pri maniero laŭ kiu ili estas taksataj. Se tamen ni konsideras, ke valoroj mem finfine estas en la menso, estas statoj de menso aŭ aspektoj de mensostatoj, ili same definitive estas ampleksataj de tiu sfero, almenaŭ koncerne priskribon de ilia naturo. Penante konservi la distingon inter psikologio kiel scienco pozitiva kaj etiko kiel scienco normiga, ni povas diri, ke psikologio devus limiĝi al priskribo kaj eksplikо, evitante pritakson. Grandparte ĝi efektive agas tiel. Sed ankaŭ ĉi tie la proceso mem de priskribo kaj ekspliko neeviteble influas nian pritakson de valoro, ekzemple en juĝoj pri bona aŭ malbona gusto, kruda aŭ altkultura morala nivelo, en juĝoj bazataj sur grado de kompleksеco kaj rafino de koncernaj mensaj procesoj. Do ankaŭ ĉi tie la limo inter psikologia kaj etika vidpunktoj povas varii kaj oni rajtas diri, ke psikologio serioze invadis la teritorion antaŭe rigardatan proprajo de ĝia parenca disciplino.

**Estetiko.**

La konsideroj pri etiko grandparte validas ankaŭ por estetiko, kvankam en ĉi tiu kazo kredantoj pri absolutaj valoroj estas malpli multaj kaj multaj pretus eĉ konsenti, ke estetiko estas nur speciala fako de psikologio. Kaj tamen la distingo inter pozitiva kaj normiga disciplino grandparte validas ankaŭ ĉi tie kaj preskaŭ same kiel por rilato inter psikologio kaj etiko. Psikologoj povas studi procesojn de estetika elekto kaj juĝo, povas priskribi kaj analizi la implicajn konajn kaj orektajn funkciojn, povas eĉ rilatigi ilin al la personeca tipo, historio de evoluo kaj „kompleksoj" de la individua subjekto, sed esence ili penas eviti estetikajn juĝojn en nocioj de fina pritakso. Ankaŭ ĉi tie tamen, samkiel en etiko, psikologiaj studoj ne estas seninfluaj je tiaj pritaksoj. Fakte, iuj artistoj ne ŝatas psikologion, timante, ke tro profunda psikologia analizo povas senigi arton je ties evidenta valoro kaj malfortigi krean povon de la artisto mem. Unuavide ĉi tiu timo ŝajnas iom pravigebla. Arto okupas specifan limregionon inter fantazio kaj aŭtisma pensado unuflanke kaj plene realisma pensado aliflanke. Tial do ĝi havas ion komunan kun neŭrozaj simptomoj. Kaj se psikanalizo aŭ iu alia psikoterapia metodo povas forigi tiajn simptomojn, ĉu ĝi ne povas do forigi ankaŭ kapablon de arta kreado kaj pritakso? Estus vane pretendi, ke ni konas plenan respondon je tiu demando. Disponeblaj faktoj tamen ŝajnas montri, ke tiu timo estas tre senbaza. Ĝi naskiĝis parte el trotakso de la povo de psikanalizo, parte el miskompreno pri ties efikoj kaj celoj. Psikanalizo celas firmigi la

mion, kaj arto estas plejparte tre „mi-kunsona". Certe, psikanalizo povas malpliigi aŭ forigi agojn malaprobatajn de la mio, interalie neŭrozajn simptomojn kaj iujn malutilajn trajtojn de karaktero, sed eĉ se ĝi intencus tion, estus ege neprobable, ke ĝi povus senigi nin je tiu impulso krei kaj ĝui arton, la impulso kiu ĉiam estis tiel konstanta kaj karakteriza trajto de homa menso en ĉiuj socioj kaj tra la tuta kronikita historio.

**Religio.**

La konflikto inter psikologio kaj religio estas iurilate pli akuta ol inter psikologio kaj etiko aŭ estetiko. Eble ĝuste en ĉi tiu kazo pli ol en la aliaj sentiĝas iam, ke la psikologia vidpunkto estas vidpunkto minacanta valorojn. Religio, alie ol etiko kaj estetiko, tute definitive kaj ĝenerale postulas nesubjektivan naturon de valoroj en formo de Dio aŭ dioj kiuj konsistigas tiujn valorojn kaj el kiuj — oni povas diri — fluas ĉiuj valoroj rekonataj de homaj estaĵoj. Ĉi tio metas religion en pli firman kaj samtempe pli vundeblan pozicion kompare kun la du supre nomitaj disciplinoj. Kondiĉe ke ni firme kredas la ekziston de dia estaĵo, religio estas tute imuna kontraŭ iu minaco flanke de psikologio, kiu rajtas studi religian konscion, sed ne povas ion diri pri la esenca naturo de la dia estaĵo mem, kiu restas objekto por teologio aŭ metafiziko. Zorgo tamen povas aperi tuj kiam ni eksupozas ebla, ke psikologio kapablas iel konvinki nin per siaj esploroj, ke religio estas pure subjektiva, ke ĝi estas nur specifa sinteno de la menso kaj ke dia estaĵo estas nur fikcio de la homa imago. Tiu zorgo povas trovi kelkan pravigon en la fakto, ke laŭ iu amerika esploro dikredantoj estas malpli multaj inter psikologoj ol inter reprezentantoj de aliaj sciencoj. Plue, estas vere, ke iuj psikologoj opiniis, ke intensiĝanta lumo ĵetata de ilia fako sur la manieron, laŭ kiu religiaj kredoj kaj sintenoj evoluas en la menso, definitive pruvis ke religio efektive estas tute subjektiva laŭ sia naturo kaj ke tial kredo je objektiva ekzisto de Dio estas „iluzio". Tio certe ne estis opinio de F r e u d (malgraŭ ke li uzis tiun terminon) aŭ de iu el la pli singardaj esplorantoj de religia psikologio ekde R i b o t, kiu ja mem konstatis, ke montri ke religiaj kredoj povas respondi al profunde radikiĝintaj kaj primitivaj homaj fantazioj, tute ne signifas pruvi, ke ili nepre estas malveraj. Eĉ se la demando pri objektiva vereco aŭ malvereco de religia dogmo povus esti respondata en sciencaj terminoj, estas dubinde, ĉu la respondo povus veni de psikologio. Malgraŭ tio, elmontrante „aŭtisman" aŭ „deziran" bazon de multaj religiaj ideoj, psikologio pliigis malfacilaĵojn jam ligitajn kun kredo pri metafizika aspekto de religio kaj tial sendube ĝi ludis sian propran rolon (kaj en lastaj jaroj gravan rolon) en la ĝenerala antagonismo inter scienco kaj religio, en la antagonismo, en kiu dum la pasinta generacio la ĉefaj protagonistoj de la scienca flanko estis geologio kaj biologio. Ĝuste ĉi tiu aperigo de skeptikismo bazata sur la fakto, ke religia kredo estas infektita de dezira pensado, estas la ĉefa faktoro en nuntempa opozicio inter la psikologia kaj religia vidpunktoj.



Sed kiam ni transiras de la religia dogmo al emociaj sintenoj implicaj en religio, psikologio akordiĝas kun defendantoj de religio, rekonante la grandan signifon de tiuj sintenoj kaj la gravan rolon kiun ili ludas same en individuo, kiel en socio. Sento de vivo en harmonio kun iu principo aŭ celo supera al individua vivo ŝajnas esenca por pli altnivelaj kontentoj kaj aspiroj de la homaro. Tiu aspiro devas trovi iun elirejon kaj kvankam organizita religio pro sia ena konservemo ne povas plene kontentigi bezonojn de pli kulturaj kaj progresemaj partoj de la homaro, ĝi povas tamen esti multrilate tre preferinda alternativo, ol iuj aliaj elirejoj ludintaj tiom eminentan rolon en nia antaŭnelonga historio.

**Politiko.**

Estas preskaŭ ĝenerale interkonsentite, ke iuj el la plej gravaj elirejoj estas en la sfero de politiko. Politika entuziasmo kaj maltolero paradantaj en la nuna jarcento preskaŭ certe estas iugrade la modernaj ekvivalentoj de similaj entuziasmo kaj maltolero antaŭe elmontrataj sur religia kampo. La bildo estas sendube malserena. La problemoj ĝin koncernantaj estas nun la plej urĝaj el ĉiuj problemoj sieĝantaj la homaron kaj por solvi ilin estas urĝe necesaj psikologiaj scio kaj sagaco. Bedaŭrinde tamen, socia psikologio, malgraŭ promesoplenaj progresoj en iuj regionoj, estas ankoraŭ lamentinde malprogresa kompare kun la vastaj taskoj frontantaj ĝin. Ankaŭ politikistoj plejparte montras malgrandan inklinon utiligi la scion jam posedatan de sociaj psikologoj kaj ne klopodas serioze por antaŭenigi psikologiajn esplorojn laŭ la skalo de la grandegaj problemoj solvendaj. En tiu fako la psikologio frontas ne tiom timon aŭ opozicion (ĉi tiu stadio ŝajnas ankoraŭ neatingita), kiom indiferenton kaj ignoron.

Kvankam la psikologio povas nun oferi malmulton, ĝi tamen meritas pli da atento ol ĝi renkontas flanke de tiuj, kiuj respondecas pri grandaj decidoj koncernantaj homan destinon. Certe, oni dediĉis ioman atenton al metodoj de mezurado kaj influado de publika opinio, sed plejparte la nun disponataj subtilaĵoj de tiuj metodoj estas evoluigataj kaj uzataj pli por aktualaj celoj, ol por larĝskala sistema esploro. Ekzisto de „stereotipoj" en sociaj sintenoj, ofte implicantaj krudajn kaj malutilegajn gentajn kaj naciajn antaŭjuĝojn, postulas pli vastan konsideron pri intergrupaj konfliktoj, samkiel pri rimedoj por modifi tiujn antaŭjuĝojn. Jen estas la problemoj, kiujn psikologoj iom klarigis per siaj relative etskalaj eksperimentoj. Observo de publikaj sintenoj povas multon instrui al ni ankaŭ pri psikaj rezistoj, kiuj malakcelas rimedojn por socia kaj ekonomia plibonigo proponatajn de aliaj sciencoj.

Tio koncernas ekzemple la grandan problemon pri alĝustigo de mondloĝantaro al vivrimedoj de la mondo, problemon okupintan la lastan kunvenon de la Brita Asocio kaj klare postulantan por sia solvo enkondukon de plibonigitaj agrokulturaj metodoj kaj limigon de kresko de la loĝantaro en multaj tro dense loĝataj landoj. Ambaŭ rimedoj, precipe la dua, estas pro-

blemoj apelantaj al niaj antaŭjuĝoj kaj emocioj laŭ maniero tre malklariganta la pripenson. Grandparte de psikanalizo ni lernis pri la evidente grava psikologia mekanismo de „splitado" aŭ „diserigado", en kiu pozitivaj kaj negativaj elementoj de iu komence ambivalenta sinteno estas apartigataj kaj direktataj al malsamaj personoj aŭ grupoj kun la tendenco krude rigardi ilin „bonaj" aŭ „malbonaj". Ne malpli grava kaj ofte ligita kun ĝi estas la mekanismo de „projekciado", per kiu niaj propraj mankoj aŭ mankoj de nia grupo estas atribuataj al aliuloj, iufoje kun patologiaj intenso kaj ignoro de realo kompareblaj kun trajtoj de individua paranojo. Kun tio estas ligita ankaŭ la danĝera tendenco, rimarkata de ĉiuj sociaj psikologoj depost Le Bon, forigi individuan konsciencon kaj prudenton favore al infana kaj nerespondeca idealigo de iu grupo aŭ ties estro kaj de ĉio, pro kio tiuj luktas — tendenco, kiu siavice povas esti sekvata de malespera seniluziiĝo. Psikologoj konstatis ankaŭ la malĝojigan delonge malklare konsciatan fakton, ke la engrupa kohero estas plej facile atingata kaj firmigata per intergrupa konflikto. Sed la signifega socia problemo, kiel atingi maksimuman internan koheron ĉe minimuma ekstera konflikto, apenaŭ estas klare formulita, por ne paroli jam pri ties esplora pritrakto. Eble (kiel tion supozis multaj eminentaj pensuloj depost William James) iu modere kontentiga solvo estas trovebla nur en iu „morala ekvivalento de milito", en iu interkonsenta direktado de homa atakemo kontraŭ tiuj fortoj de la naturo (eble inkluzive iujn en la homa menso mem), kiuj endanĝerigas kaj malfeliĉigas la homan vivon.

En ĉiuj ĉi kaj en multaj aliaj kazoj psikologoj atentigis pri faktoroj intime ligitaj kun la danĝeroj sieĝantaj nin en la politika sfero, bedaŭrinde tamen ĝis nun ne ekzistas iu „politika psikologio" komparebla al la jam firme establitaj fakoj medicina, industria aŭ eduka de psikologio. Nia tiel nomata socia psikologio ĝis nun havas nur supraĵajn kontaktojn kun severaj politikaj realaĵoj, sur kiuj nia civilizo tiel facile povas ŝiprompiĝi.

Je la pli pozitiva flanko, la freŝdataj eltrovoj de kultura antropologio kun ties precipe psikologia perspektivo konsciigis nin pri grandegaj variaĵoj en kulturformoj tipaj por la homa socio kaj montris al ni ke ĉiu tia formo havas kaj bonefikajn kaj malbonajn trajtojn; tiamaniere ĝi instruas nin esti pli toleremaj rilate al kulturoj diferencaj de la nia. Pruvoj pri homa adaptebло liveritaj de tiuj eltrovoj ĵetas esperigan lumradion sur la cetere malluman scenon kaj kuraĝigas multajn psikologojn al la kredo, ke la terure urĝaj problemoj de homaro en socia kaj politika sfero estos definitive solveblaj, se oni nur trovos la ĝustan aliron. Oni konscias plue, ke tiu aliro devas esti provata sur multaj niveloj — de infanejo ĝis ŝtatista konsilantaro. Estas evidente, ke tia aliro postulas kombinitan kaj kunordigitan penadon de laborantoj en multaj diversaj fakoj. Jen estas la pozicio akceptita antaŭ du jaroj de la granda Internacia Kongreso por Mensa Sano en Londono. Ĝi estas ankaŭ la fundamenta pozicio de la Monda Federaĵo por Mensa Sano, fondita dum tiu kongreso. Ĝi implicas programon, kiu laŭ terminaro tie akceptita, estas



interfaka kaj interprofesia kaj postulas, ke psikologo kunlaboru kun reprezentantoj de multaj parencaj fakoj. Ĉiukaze, ni povas esti certaj, ke en la tuta laboro la psikologia vidpunkto konservos sian gravecon. Ni povas entrepreni tiun taskon kun ioma ŝanco de sukceso nur se ni akceptas senantaŭjuĝan kaj konan pozicion rilate al homa menso en ties sennombraj aperaĵoj en ĉiuj diversaj kaj ofte konfliktantaj formoj de homa socio. En politiko tiu vidpunkto estas ĝis nun bedaŭrinde neglektata; niaj pasioj kaj antaŭjuĝoj ĝis nun danĝere influas la rilatojn inter homaj grupoj. Eĉ aparte de efektiva pligrandigo de sciencaj konoj, la nura akcepto de la psikologia vidpunkto kun ties kvieta, sed ne sensimpatia objektiveco estus grava prepara paŝo al pli bona kompreno inter homoj de diversaj kulturoj, gentoj, ideologioj kaj nacioj. Dum nia nuna krizo ni povas ripeti kun pli profunda konvinko kaj pli granda sento pri urĝeco, ke „la ĝusta studo de homaro estas studo pri la homo mem". Kaj la psikologio estas la plej intima scienco kiu nuntempe faras tiun studon.

**Homa uzo de energio.**

Unu lastan vorton pri la ĉefa temo de ĉi tiu kunveno de la Brita Asocio: pri la homa uzo de energio. En ĉiu sia apliko la psikologio celas plibonigi la uzon de la propra energio de la homo, de lia korpa kaj mensa energio. Ĝuste ĉi tie, en lia propra organismo komenciĝas la homa uzo de energio kaj nur pere de tiu energio li povas funkciigi aŭ modifi energiojn de la ekstera mondo. La granda progreso de la fizikaj sciencoj ebligis al la homo uzon kaj regon de tiuj eksteraj energioj ĝis grado konsistiganta gravan minacon kontraŭ lia propra ekzisto, se li uzos ilin malsaĝe. Sed li povos uzi ilin saĝe nur se li povos direkti al bonutila celo la enajn energiojn de sia propra menso. Ĝuste la psikologio povas instrui lin pri la naturo de tiuj energioj kaj pri eblaj metodoj por direkti ilin. Tial do la psikologio okupas ŝlosilpozicion en la tuta problemo de la homa uzo de energio. Estas devo de la psikologoj plene ekkonscii la grandan respondecon ŝarĝantan ilin ĝuste pro tiu fakto.

**Difinoj de kelkaj neologismoj.**

**Ambivalento.** Samtempa okazo de kontraŭaj aŭ kontraŭstarantaj emocioj aŭ streboj rilate al la sama persono aŭ objekto.

**Aŭtismo.** Pensotipo regata de subjektivaj emoj, flankenlasanta realajn faktorojn.

**Behaviorismo.** La teoria vidpunkto laŭ kiu ĉiuj psikaj fenomenoj povas esti adekvate pritraktataj per pure objektivaj metodoj sen aludo al la konscio. (Eble oni povus uzi por ĉi tiu nocio la terminon „kondutismo").

**Edukto.** La produkto de novaj konaj eroj de jam konataj karakteroj aŭ rilatoj.

**Epifenomeno.** Okazaĵo kiu akompanas iun alian procedon aŭ fenomenon sed kiu mem havas nenian kaŭzan efikon.

**Inhibicio.** La parta aŭ tuta ĉesigo de iu funkcio pere de kontraŭaj funkcioj.

**Orekto.** (A. *„orexis"*, adj. *„orectic"*) La emociaj kaj/aŭ strebaj ecoj de la menso diferencigitaj de la konaj ecoj.

**Paranojo.** Speco de frenezo, kiun karakterizas, i.a., ke la paciento kredadas ke ĉio kaj ĉiu kontraŭagas lin; sekve li malamike turnas sin kontraŭ ĉiun.

**Traŭmo** (psika). Emocia ŝoko kiu povas kaŭzi daŭrajn mensajn malordojn.